

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1995:6

• ARGÅNG 1 • MÅNDAGEN 30 OKTOBER 1995

Supporterspic stoppa fotboll

Esperanto unuapaga novajo

Gun-Britt Plöninge (t h) undervisar eleverna i klass 9A på Hjulstaskolan i esperanto. De pluggar helt

Konstgjort språk får

STOCKHOLM Människor med olika språk som ska arbeta sida vid sida. Problemen som uppstår är lika stora i en högstadielklass i Stockholms förorter som inom EU-byråkratin.

Men det finns en 100 år gammal lösning som är på väg att prövas på nytt - det konstgjorda universalspråket esperanto.

I klass 9A på Hjulstaskolan har bara

Unz kvinna hittad

Restauranzbesökare

Id

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Januaro 1996 • 83-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Agneta Emanuelsson
Kaisa Hansen (red. sekreterare)
Franko Luin (teknisk redaktör)
Bengt Nordlöf

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorn

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: Rönquist & Co, Sollentuna

Prenumeration 1996: 150 kr.

Gåvoprenumeration till utlandet: 80 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1995:

Direktansluten medlem 150 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr. Ungdomsmedlem
(max 20 år) 60 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund
och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00


Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Seminariégatan 3 A, 752 28 Uppsala

**OBS! Esperantoförlagets
Malmöadress är
inte längre aktuell.**

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

KLUBA AGADO

Tradicia lumfesto en la lernejo de Hjulsta



En la manĝejo regas mallumo. Nur kandeloj sur la tabloj iom lumigas la ejon. Ni solene kaj antaŭgajante atendas. Subite eksonas kanto de malantaŭe, malproksime. La kantado fortiĝas kaj ni perceptas la vortojn: "Peze la nokto nun, domojn alpaŝas. Teron forlasis sun", ombroj ĝin kaŝas..."

Alvenis la reĝino de lumo, sankta Luĉio, akompanata de siaj honorfraŭlinoj kaj koboldoj. Ŝia krono el lumigitaj kandeloj kaj la kandeloj en la manoj de aliaj en la procesio, kune kun la konata kanto, donas al ni ĉiuj senton de espero pri revenonta lumo al nia nun vintra kaj malhela lando.

Tradicia kolektiĝo

La vera tago de sankta Luĉio estas la 13-a de decembro, sed ne ĉiam tiu tago taŭgas por kolektiĝi kaj festi. La esperantistaro en la stokholma regiono tradicie okazigas sian komunan lumfeston meze de decembro. Ĉijare ĝi okazis la 9-an de decembro kaj aranĝis ĝin esperanto en Väsby kaj klaso 9A el la lernejo de Hjulsta. Jen, kaj ni, kvardeko da geesperantistoj, troviĝis en lernejo!

Projekto Gresillon

La klaso 9A, konsistanta el 28 gelernantoj, jam de septembro studas esperanton en sia libera tempo. La celo estas printempe partopreni en junulara renkontiĝo en Gresillon, Francio. Por atingi tion necesas lerni la internacian lingvon kaj trovi monon, ĉar gravas, ke ĉiuj en la klaso partoprenu! Oni komprenoble petis stipendiojn de diversaj fondaĵoj. La fondaĵo por intereŭropaj rilatoj de gejunuloj, ekzemple, jam

Jen Luĉio kun akompanantaro kantantaj la tradiciajn kantojn – en esperanto. La knabo apud Luĉio, kiu ne estas Staffan, estis kante gratulata – ankaŭ en esperanto, kompreneble – de siaj samklasanoj, ĉar li festis sian naskiĝtagon.

(fotis G-B Plöninge)

decidis pri stipendio de 40 000 svedaj kronoj. Krom tio la gelernantoj energie bakas kukojn, aranĝas loteriojn kaj diversmaniere laboras por kolekti la bezonatan sumon.

Ludas gravegan rolon

Aranĝante la lumfeston de la esperantistoj de la stokholma regiono la klaso bone montris, ke ili akiris la kapablon kunlabori por atingi komunan celon. Ilia instruistino *Gun-Britt Plöninge* ankaŭ ludas gravegan rolon en tio, apogante kaj ĉiam helpante ilin.

Bonvensalutis nin *Elisabeth Sörhuus*, rektoro de la lernejo, per longa parolado en perfekta esperanto – sen kono de la internacia lingvo! Ŝia apogo al Projekto Gresillon sendube tre gravas.

Espero por estonteco

La festo daŭris per kutimaj gajaj babildoj, festparoloj, kantado, manĝado de bongustaj bulkoj kaj kukoj.

Kiam ni fine foriris el la lernejo en la malhelan kaj malvarman eksteron, ni kunportis senton de espero pri la hela estonteco, kaj laŭlitera kaj metafora. Krom tio multaj el ni kunportis aĉetitan bakajon de la nelaciĝema klaso 9A.

Anita Bergh

Unuapaĝa novaĵo

La 30-an de oktobro 1995 esperanto estis unuapaĝa novaĵo en la stokholma ĵurnalo *Metro* (230 000 ekzempleroj, senpaga distribuo en la metroa reto).

La sensacia novaĵo estis, ke tuta klaso en Hjulsta, urboparto speciale riĉa je enmigrintoj, decidis eklerni esperanton kaj planis vojaĝon al la franca kastelo Gresillon.

Klaso 9A, pri kiu temas, konsistas el gelernantoj de tre varia deveno. Nur du en la klaso havas la svedan kiel hejmlingvon, la ceteraj venas el dekduo da malsamaj landoj kaj parolas naŭ diversajn lingvojn.

Ne temas pri subita decido de la klaso, sed longa planado kaj preparlaboro. **Kaisa Hansen** laboris dum iom da tempo en tiu lernejo kaj, kompreneble, informadis ankaŭ pri esperanto. Unu el la instruistinoj, **Gun-Britt Plöninge**, tiom interesiĝis, ke ŝi mem eklernis esperanton. Interesita fariĝis ankaŭ la rektorino de la lernejo kaj tio ebligis diskuti la eblecon instrui esperanton al tuta klaso.

Klaso 9A, por kiu Gun-Britt estas ĉefinstruisto, estis pli frue unu el la "problemaj" klasoj de la lernejo, laŭ la eldiroj de la gelernantoj mem. Ili bruemis kaj malfacile kunlaboris. Kiam la in-

struistino proponis al ili, ke ili eklernu esperanton kun la celo vojaĝi al franca kastelo, ili tion akceptis kaj tio estis – dum sufiĉe longa periodo – ilia sekreta projekto.

La klaso havis subite ion komunan pri kio kunlabori. Ili komencis organizi diversajn agadojn por havigi monon por la vojaĝo (temas pri alta sumo, entute ĉirkaŭ 150 000 kronoj). La klaso ne nur eklernis esperanton, sed fariĝis ankaŭ la modela klaso de la lernejo!

La gazetaro kutime skribas pri la negativaj aspektoj de loĝado en la urboparto Hjulsta. Subite oni povis skribi ion pozitivan kaj dediĉis ne nur grandan parton de la unua paĝo al tio, sed ankaŭ abundan spacon interne de la gazeto [*Metro* havas cetere nur mallongajn artikolojn].

Unu semajnon pli poste *Dagens Nyheter*, la plej granda sveda matena ĵurnalo, ankaŭ havis artikolon pri klaso 9A en Hjulsta kaj ilia "projekto Gresillon". Ne same okulfrape kiel *Metro*, sed same bonvene. Kaj la klasanoj plu lernas esperanton je la envio de aliaj klasoj, kiuj ne havas tiun privilegion.

Ni semas kaj semas konstante...

inko

Malsukcesa vojaĝklopodo

En nia lando estas malfacile imagi al si la obstaklojn, kiujn renkontas afrika vojaĝanto. Antaŭ pli ol jaro komenciĝis la preparoj por la partopreno de **Lutombo Yogolelo** el Zairio en la Tamperea UK. Temis pri monkoloktado por la biletoj kaj petoj pri vizoj. Al la monkoloktado kontribuis, inter aliaj, pluraj svedaj esperantistoj. Lige al la vizito en Finnlando ankaŭ vizito al Svedio estis planita, se aranĝebla.

Por Yogolelo la plej simpla maniero vojaĝi estas per flugo de Bujumbura en Burundio. La plej favora bileto estis aĉetita de Sabena, belga flugkompanio. Kaj jen, la obstakloj aperis.

Homoj en Nederlando, Finnlando kaj Svedio kontaktis, kontaktadis aŭtoritatojn por la akiro de diversaj vizoj. Estis bezonata ankaŭ belga transitvizo pro la ŝanĝo de aviadilo en Bruselo, kaj ĝin oni ne donis. Fervora aktiveco tamen okazis ĝuste antaŭ la planita forveturo kaj ĉiuj envolvitaj en la afero esperegis, ke ne okazu io al Yogolelo lastminute.

La UK pasis sen la partopreno de Yogolelo. Nur post monato venis klarigo: li havis nur la burundian transitvizon en la pasporto, leteron de la finna konsulo, ke li akiru vizon ĉe la flughaveno en Helsinko kaj fakson de la aŭtoritatoj, ke transitvizo atendas lin ĉe la flughaveno en Bruselo. Kaj tion la oficistoj de Sabena ne akceptis. Spite al paperoj kaj lia insistado, oni ne permesis al li eniri la aviadilon.

Anstataŭ kongreson Yogolelo spertis gravan atakon de malario kaj poste teknikajn problemojn por klariga fakso.

Mi ŝatus malgraŭ ĉio danki al la donacintoj.

Anita Dagmarsdotter

INTERNACIA SUKCESO!

ETIMOLOGIA VORTARO
DE ESPERANTO

N de Ebbe Vilborg **R**

Volumo 4 jam aperis

Prezo: 150 kr
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm
Poŝtĝiro 578-5

Kvara Afrika Kongreso

Temo: Imagoj pri Afriko: kontinento de espero aŭ de malespero?

Loko: La urbo Moshi sur la deklivo de Kilimanĝaro

Ekskursoj: Nacia parko Aruŝa; al la pinto de Kilimanĝaro; helpo aranĝi laŭ persona deziro, ekz. al Zanzibaro aŭ Daresalamo

Prezo: kongreso kaj ekskurso al Aruŝa = 620 NLG; Kilimanĝaro = 690 NLG; flugo el Amsterdamo = 1980 NLG

Informoj: en revuo *Esperanto* julio-aŭgusto 1995

UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Loka adreso: TEA, Constantine Masha-
uri, P.O.Box 23390 Dar-es-Salaam,
Tanzanio

Se vi ne povas vojaĝi mem, sed ŝatus helpi al junaj afrikaj esperantistoj veni tien, sendu donacon aŭ donaceton al la konto "kvar-z" ĉe UEA, sveda poŝtĝira konto 7 43 74 - 0. Antaŭdankon!

Katrineholm nästa!

SEFs årskongress kommer att äga rum i Katrineholm den 10–12 maj.

Under hela fredagen kommer olika aktiviteter att äga rum med inbjudna gäster. Mera om detta kommer i nästa La Espero. Därefter kommer våra ordinarie diskussioner och möten under lördagen och söndagen.

Det blir ett jubileumskongress, men i lika hög grad en kongress med blickar framåt.

Esperantoregionen Södermanland-Östergötland hälsar dig varmt välkommen till Katrineholm fredag t o m söndag 10–12 maj 1996.

Kongressen äger rum på vårt Stads-hotell, där vi också ska bo, ha 90-årsbankett med underhållning, höra föredrag om språket av John Wells, den förra ordföranden i UEA, om Valdemar Langlet, vår historia, gå på kurs, handla på auktion, se på utställning, ha kontakt med världen via internet, äta gott, sjunga, dansa och ha trevligt tillsammans i alla åldrar. Alternativt boende finns också och mer information kommer i nästa nummer av *La Espero*.

Den som kommer tidigt på fredagen kan lyssna på spännande debatt om flerspråkighet, språk i EU och FN m.m. med bl.a. Theodor Kallifatides. Till denna debatt inbjuds även Katrineholm, bl.a. politiker, lärare, elever, skollärdare...

Yngre än esperanto

Katrineholm blev stad 1917, ett resultat av järnvägens tillkomst 1862 och ett antal driftiga företagares beslut att

starta verksamhet i denna del av Södermanland.

Katrineholm är en industristad med stora företag som SKF, Ericsson, Elektro-Standard och Sörmlands Grafiska. Men också skolstad med gymnasium, folkhögskola och den rikskryterande Katrineholms Tekniska Skola. Även högskoleutbildningen ökar med Lärcentrum och decentraliserade kurser.

Vår utbildningsnämnd har tagit ett beslut om att esperanto kaj läsas som C-språk eller väljas som lokalt tillval. Rektorer, språklärare och elever får nu information, som mottagits positivt.

Staden är ung, men bygden är gammal. Vårkulturen anses vara Sveriges äldsta jordbrukskultur, och där dessa människor levde finns nu en stenålders by som vi troligen passerar under söndagens utflykt till Lerbo, där Valdemar Langlet föddes och levde en stor del av sitt liv. Langlet var SEFs förste ordförande och hade samma post i Uppsalaklubben, som han var med och bildade. Världens andra esperantoklubb!

Gammal kultur

Också på andra håll i kommunen finns minnen av gammal kultur och bebyggelse.

Julita gård och museer ligger inom kommunen. Det är Sveriges största utomhusmuseum med en stor mängd turistbesök. Vi har även den vackra herrgården Stora Djulö, som nu är kommunens representationsvåning. Här finns även servering för allmänheten, och den hyrs ut för privata fester.

Det var i en liten stuga i närheten som Selma Lagerlöf fick höra berättelsen om Den Sköna Lustgården, där



hertig Karl gick och grävde. Hon lät Nils Holgerson komma hit till Stora Djulö, men inte in i huset. Kanske blev hon själv inte inbjuden... Vi kommer att få tillfälle till detta bara tiden räcker till.

En esperantoutställning

Inte bara Selma Lagerlöf har skrivit om Katrineholm. Nästan lika kända är säkert Kerstin Ekmans katrineholmsböcker. Vårt bibliotek är välkänt och värt ett besök. Här finns inte bara en stor mängd böcker på esperanto utan ett fantastiskt, unikt dockmuseum, kläder och andra föremål från gammal tid.

En esperantoutställning visas den 15–28 april. Hör av dig om du har något material eller minnen att bidra med. Det kommer att handla om SEFs 90 år, Valdemar Langlet och hans liv samt det fina skolungdomsutbytet mellan en skola i Katrineholm och Valdemar Langlet-skolan i Budapest, där många av barnen läser svenska som första främmande språk. Deras lärare Agnes Morandini-Harrach, som också är tolk på TV, har börjat att läsa esperanto och kommer att berätta om Valdemar och Nina Langlet för oss.

Välkommen till Katrineholm i maj!
Agneta Emanuelsson

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

aranĝos seminario la 23-an kaj 24-an de marto en Karlskoga Altlernejo. La temo de la seminario estos

La bela lingvo

Kontribuos: Otto Prytz (*Etnolingve unu, esperantlingve pluraj; la nuancorico de esperanto*), Spomenka Štimec (*Rio estas esperantokulturo?*), Jon Rømmesmo (*Divo de esperanto-familio — esperanto kaj infanoj*) kaj Sten Johansson (*Por kio esperanto bezonas literaturon?*).

Natalja kaj Andreo Berce kantos kaj ludos, Ann-Sofie prezentos pupteatraĵon.

Prezoj: 660 kr en unulita ĉambro, 550 kr en dulita ĉambro, 530 en trilita ĉambro, ĉiuj inkl. littukoj kaj manĝoj. Amasloĝejoj: 50 kr, sen manĝoj.

Aldoniĝas alĝikotizo je 150 kr, pagenda plej malfrue la 15-an de februaro al poŝtgiro 5 15 11-4, Sv. Esperanto-Institutet. Notu vian mendon sur la pagilo.

Informoj: Sveda Esperanto-Instituto, p/a Märtha Andréasson, L. Tolsereds väg 2265, 425 42 Hisings Kärra. Tel/fakso 031 - 57 11 33.

RONJO, rabista filino

I

En tiu nokto, kiam naskiĝis Ronjo, fulmotondris en la montaro. Jes, estis tia fulmotondra nokto, ke ĉiuj troluloj loĝantaj en la Matisarbaro terurigitaj kaŭris en siaj kavoj kaj rifuĝejoj. Nur la kruelaj harpioj ŝatis fulmotondron pli ol ĉiujn aliajn veterojn, kaj flugis kriante ĉirkaŭ la rabista kastelo sur Matismonto. Tio ĝenis Lovison, kiu estis naskonta infanon, kaj ŝi diris al Matiso: "Fortimigu la bruantajn harpiojn, alie mi ne povas aŭdi, kion mi kantas." Loviso nome kantis dum ŝi estis naskanta. Tio faciligas la akuŝon, ŝi asertis, kaj la ido certe havos gajan humuron, se ĝi naskiĝas kun kanto.

Matiso prenis sian arbaleston kaj ĵetis du sagojn tra la paffenestreto.

"Foriru, harpiaĉoj", li diris. "Mi ja havos infanon ĉi-nokte. Ĉu vi tion komprenas, megeroj!"

"Hoho, li havos infanon ĉi-nokte", kriegis la harpioj, "fulmotondran infanon, sendube etan kaj malbelan, hoho!"

Tiam Matiso denove pafis rekte en la harpiaron. Sed ili nur mokridis al li kaj flugis kun koleraĵ krioj foren super la arbopintoj.

Dum Loviso kuŝis naskante kaj kantante, kaj dum Matiso laŭ povo punis la harpiojn, liaj rabistoj sidis ĉe la fajro en la granda ŝtonhalo manĝante kaj drinkante kaj bruis kaj bruegis same laŭte kiel la harpioj. Ion ili ja devis fari dum la atendo, kaj ĉiuj dek du vere atendis ion, kio okazos tie supre en la turĉambro. Ĉar en ilia tuta rabista tempo ne estis naskita infano en la kastelo de Matiso. Plej multe atendis Kalva Petro.

"Ĉu tiu rabista ido ne baldaŭ venos?" li diris. "Mi estas maljuna kaj kaduka kaj baldaŭ elvivis mian rabistan vivon. Estus bone ekvidi novan rabestron antaŭ ol mi finos."

Li estis ĵus dirinta tion, kiam la pordo malfermiĝis kaj Matiso enkuris preskaŭ sensaĝa pro ĝojo. Kun laŭtaj ĝojsaltegoj li rondkuris en la salono kaj kriis kiel frenezulo.

"Mi ekhavis idon! Ĉu vi aŭdas kion mi diras, mi ekhavis idon!"

"El kiu speco ĝi estas?" demandis Kalva Petro en sia anguleto.

"Rabista filino, triumfo kaj ĝojo!" kriis Matiso. "Rabista filino, jen ŝi venas!"

Kaj trans la alta sojlo paŝis Loviso kun la infano en siaj brakoj. Tiam fariĝis abrupta silento inter la rabistoj.

"Nun ŝajnas al mi, ke la biero fiksiĝis en viaj gorĝoj", diris Matiso. Li prenis la knabinon de Loviso kaj portis ŝin en la rondon de la rabistoj.

"Jen, se vi volas vidi la plej belan infanon, kiu iam naskiĝis en rabista kastelo."

La filino kuŝis sur la brako kaj rigardis lin per viglaj okuloj.

"Tiu ĉi idino jam komprenas iomete de ĉio ajn, tion oni vidas", diris Matiso.

"Kiun nomon ŝi havos?" scivolis Kalva Petro.



"Ronjo", diris Loviso. "Kiel mi jam antaŭ longe decidis."

"Sed se vi estus naskinta knabon?" diris Kalva Petro.

Loviso rigardis lin trankvile kaj severe.

"Se mi decidis, ke mia infano havu la nomon Ronjo, tiam fariĝos Ronjo."

Poste ŝi turnis sin al Matiso:

"Ĉu vi deziras, ke mi prenu ŝin nun?"

Sed Matiso ne volis forlasi sian filinon. Li staris mirigite, rigardante ŝiajn klarajn okulojn, ŝian buŝeton, ŝiajn nigrajn hartufojn, ŝiajn senhelpajn manojn, kaj li frostotremis pro amo.

"Infano, en tiuj etaj manoj vi jam tenas mian rabistan koron", li diris. "Mi ne komprenas tion, sed tiel estas."

"Ĉu mi rajtas teni ŝin iomete", petis Kalva Petro kaj Matiso metis Ronjon en liajn brakojn, kvaŭzaŭ ŝi estus ora ovo.

"Jen vi havas la novan rabistestron, pri kiu vi longe parolis. Sed ne lasu ŝin fali, ĉar tiam alvenis via lasta momento."

Sed Kalva Petro nur ridetis al Ronjo per sia sendenta buŝo.

"Ŝi ne multe pezas", li diris mirigite kaj levis-mallevis ŝin kelfoje.

Tiam Matiso ĉagreniĝis kaj abrupte reprenis la infanon.

"Kion vi atendis, ŝafkapulo? Grandan dikan rabistestron kun ventregoj kaj pintbarbo, aŭ kion?"

Tiam ĉiuj rabistoj komprenis, ke oni ne povas fari rimarkojn koncerne tiun ĉi infanon, se oni deziras ke Matizo restu bonhumora. Kaj vere ne estis saĝe ĉagreni lin. Tial ili tuj komencis laŭdi la novnaskiton. Ili ankaŭ malplenigis multajn pokalojn da biero je ŝia honoro kaj tiel gajigis Matison. Li okupis la honorsidejon inter ili kaj ĉiam denove eksponis sian mirindan infanon.

"Tio ĉi mortincitos Borkon", diris Matiso. "Li sidu en sia kaduka rabestejo kaj grincu la dentojn pro envio, jes, ĝemo kaj morto, fariĝos tia grincado ke ĉiuj harpioj kaj grizgnomoj en la Borkarbaro devos permane ŝirmi siajn orelojn, kredu min."

Kalva Petro kapjesis kontente kaj diris kun eta subridido:

"Jes, tio mortincitos Borkon. Ĉar nun pluvivos la gento de Matiso, sed la gento de Borko rapide pereos."

"Jes", diris Matiso, "rekte pereos, ĉar laŭ mia scio Borko ne sukcesis ekhavi idon, kaj certe ne sukcesos."

Tiam sonis ektondro, kian oni neniam antaŭe aŭdis en Matisarbaro. Ĝi estis tiel forta, ke eĉ la rabistoj paliĝis, kaj Kalva Petro falis planken, li ja estis malforta. De Ronjo oni neatendite aŭdis etan ploron, kaj tio skuis Matison pli ol la fulmotondro.

"Mia infano ploras", li kriis. "Kion fari, kion fari?"

Sed Loviso staris trankvila. Ŝi prenis la infanon de li kaj metis ĝin al sia mamoo, kaj ploro ne plu estis.

"Tio tondris bone", diris Kalva Petro, kiam ankaŭ li iom trankviliĝis. "Diablo prenu, se ĝi ne trafis."

Jes, la fulmo trafis kaj kun granda efiko, tion oni povis vidi la sekvan matenon. La pratempa kastelo de Matiso estis fendita en du partojn. De la supro ĝis la plej profunda kela

arkaĵo ĝi estis dividita en du partojn, kaj inter ili estis profunda abismo.

"Ronjo, via infana vivo komenciĝas grandioze", diris Loviso, kiam ŝi kun la infano en la brakoj staris apud la frakasita mursupro kaj rigardis la plorindaĵon. Matiso furiozis kiel sovaĝa besto. Kiel povas okazi tia afero al la malnova kastelo de liaj prauloj? Sed Matiso neniam longe eltenis en sia furiozo, kaj li ĉiam trovis kaŭzojn konsoliĝi.

"Nu, ni ne plu havas tiom da sekretaj irejoj kaj kelaj ĉambroj kaj rubaĵoj por prizorgi. Kaj eble neniu nun misiros en la kastelo de Matiso. Vi memoras kiel estis, kiam Kalva Petro perdiĝis kaj reaperis nur post kvar tagoj."

Tion Kalva Petro preferis ne memori. Ĉu estis lia kulpo, ke okazis tiel malfeliĉe? Li ja nur volis esplori kiel granda kaj kolosa vere estas la kastelo de Matiso, kaj, kiel dirite, trovis ĝin sufiĉe granda por perdiĝi. La kompatindulo estis preskaŭ duonmorta antaŭ ol li finfine retrovis la grandan ŝtonhalon. La rabistoj, danko kaj laŭdo, tiel kriegis kaj bruis, ke li aŭdis tion de longe for, alie li neniam estus retrovinta la vojon hejmen.

"La tutan kastelon ni ja ĉiuokaze neniam uzis", diris Matiso. "Kaj ni daŭre restos en niaj haloj kaj turĉambroj, kie ni ĉiam loĝis. Kio ĉagrenas min estas nur, ke ni perdis nian necesegan ĉambro. Jes, lamento kaj morto, ĝi nun troviĝas ĉe la alia flanko de la abismo, kaj mi kompatas tiun, kiu ne povas sin bridi ĝis ni aranĝos novan."

Sed tiu afero baldaŭ estis farita, kaj la vivo en la kastelo de Matiso fluis ĝuste kiel antaŭe. Nur kun la diferenco, ke nun estis ankaŭ infano tie. Eta infano, kiu laŭ Loviso iom

post iom tute stultigis Matison kaj liajn rabistojn. Kompreneble ne malutilus al ili fariĝi iom pli delikatanimaj kaj iom pli decaj en sia konduto, sed ĉio devas havi limon. Ĉar ja ne estis nature vidi dek du rabistojn kaj unu rabistan estron sidi ŝafe ridetantaj nur pro tio, ke idineto ĵus lernis ĉirkaŭrampi en la ŝtonhalo, kvazaŭ pli granda miraklo neniam esus okazinta sur la tero. Verdire Ronjo movis sin neordinare rapide, ĉar ŝi havis artifikan manieron puŝi per sia maldekstra piedo, kiun la rabistoj trovis unika.

"Sed finfine, plej multaj infanoj lernas rampi", diris Loviso. "Sen fortaj laŭdoj kaj sen ke la patro pro tio forgesas ĉion kaj eĉ neglektas sian laboron."

"Ĉu estas via intenco, ke Borko transprenu la tutan rabadon ĉi tie en Matisbarbo?" ŝi demandis severe, kiam la rabistoj, kaj Matiso unua, tro frue hejmensturmis nur ĉar ili nepre volis rigardi, kiam Ronjo manĝas sian vesperan supon, antaŭ ol Loviso metos ŝin en la pendlulilon por la noktoto.

Sed Matiso ne aŭskultis tian babiladon.

"Ronjo mia, mia kolombeto", li kriis, kiam Ronjo puŝante per la maldekstra piedo fulmrapide rampis al li, tuj kiam li aperis ĉe la pordo. Kaj poste li sidis kun sia kolombeto sur la genuo kaj manĝigis ŝin per supo, dum liaj dek du rabistoj rigardis. La supujo staris iom for ĉe la fajrejo, kaj kun siaj krudaj rabistaj manoj Matiso estis iom mallerta, multe da supo verŝiĝis sur la plankon. Krome Ronjo jen kaj jen forpuŝis la kuleron kaj supo flugis en la brovojn de Matiso. La unuan fojon kiam tio okazis, la rabistoj ridegis tiel forte, ke Ronjo ektimis kaj ploris, sed ŝi baldaŭ komprenis, ke ŝi faris ion amuzan kaj volonte ripetis tion. Tio pli ĝojigis la rabistojn ol ĝi amuzis Matison. Sed cetere Matiso opiniis, ke ĉio entreprenata de Ronjo estas unika kaj ke ŝi mem estas sen egalulo sur la tero.

Eĉ Loviso devis ridi, vidante Matison sidi kun la ineto sur la genuo kaj supo en la brovoj.

"Matiso, karulo, kiu povus kredi, ke vi estas la plej potenca rabista ĉefo en ĉiuj montoj kaj arbaroj? Se Borko nun vidus vin, li certe enpigus sian pantalonon pro rido."

"Mi zorgus, ke li rapide lernus tion ne fari", Matiso diris trankvile.

Borko estis la ĉefmalamiko. Same kiel la patro kaj avo de Borko estis ĉefmalamikoj de la patro kaj avo de Matiso. Jes, multe pli longe ol iu povis memori, la gentoj de Borko kaj Matiso estis malamikoj. Ili ĉiam estis rabistoj, kaj teruraĵo por la honestaj homoj, kiuj kun siaj ĉevaloj kaj ĉaroj kaj transportoj devis trapasi la densajn arbarojn, kie ili vivis.

"Dio helpu tiun, kiu devas trapasi la Rabistan pasejon", homoj kutimis diri, kaj tiam ili aludis la arbarpasejon inter la arbaroj de Borko kaj Matiso. Ĉiam kuŝis tie rabistoj atendantaj konvenan okazon por rabado. Ĉu temis pri rabistoj borkaj aŭ matisaj, tio estis afero indifera por la rabitoj. Sed por Matiso kaj Borko la diferenco estis granda. Ili riskis siajn vivojn batalante pri la rabaĵo, kaj ili ne hezitis rabi unu de la alia, kiam ne venis sufiĉe da transportoj tra la Rabistpasejo.

Pri tio Ronjo sciis nenion, ŝi estis tro eta. Ŝi ne komprenis, ke ŝia patro estas timiga rabista ĉefo. Por ŝi li estis nur tiu bona barbulo Matiso, kiu ridas kaj kantas kaj krias kaj donas al ŝi supon. Lin ŝi ŝatis.

Sed ŝi kreskis tagon post tago, kaj iom post iom komencis esplori la ĉirkaŭan mondon. Longe ŝi kredis, ke la granda ŝtonhalo estas la tuta mondo. Kaj tie ŝi bonfartis, tie ŝi sidis tute sekura sub la longa tablego kaj ludis per pinkonusoj kaj ŝtonoj, kiujn Matiso kolektis kaj hejmenportis por ŝi. Kaj la ŝtonhalo vere ne estis malbona loko por infano. Multon ĝojan oni povis sperti kaj multon lerni. Ronjo ŝatis aŭdi la rabistojn kanti antaŭ la fajro vespere. Ŝi sidis silente sub la tablego kaj aŭskultis, ĝis ŝi sciis ĉiujn rabistajn kantojn. Poste ŝi kunkantis per sia plej klara voĉo, kaj Matiso miregis pro sia unika infano, kiu kantis tiel bele. Ankaŭ danci ŝi lernis. Ĉar se la rabistoj estis aparte bonhumoraj, ili dancis kaj saltadis ĉirkaŭ la salono kiel frenezuloj, kaj Ronjo baldaŭ lernis, kiel oni faru. Ankaŭ ŝi dancis kaj saltis kaj faris rabistajn saltigojn, je ĝojo de Matiso. Kaj kiam la rabistoj poste eksidis ĉe



la longa tablego por refreŝigi sin per pokalo da biero. Matiso fanfaronis pri sia filino.

"Ŝi estas bela kiel feino, konsentu tion. Same svelta, same nigraokula kaj same nigraharara. Vi neniam vidis tiel ĉarm-an idon, konsentu tion."

Kaj la rabistoj kapjesis kaj konsentis. Sed Ronjo sidis silenta sub la tablo kun siaj pinkonusoj kaj ŝtonoj, kaj kiam ŝi vidis la rabistajn piedojn en kaproharaj pantofloj, ŝi ludis, ke ili estas ŝiaj malobeemaj kaprinoj. Tiajn ŝi vidis en la kaprino, kien Loviso kunprenis ŝin dum la melkado.

Sed pli multe ol tion Ronjo apenaŭ vidis dum sia eta vivo. Ŝi sciis nenion pri la mondo ekster la kastelo de Matiso. Kaj iun belan tagon Matiso komprenis – kiom ajn li malŝatus tion – ke nun venis la tempo.

"Loviso", li diris al sia edzino. "Nia infano devas ekscii, kia estas la vivo en la Matisarbaro. Lasu ŝin libera."

"Ĉu finfine vi komprenis tion", diris Loviso. "Tion ni devus fari antaŭ longe, laŭ mia opinio."

"Gardu vin kontraŭ kruelaj harpioj kaj griznomoj kaj Borkorabistoj", li diris.

"Kiel mi sciu, kiuj estas harpioj kaj griznomoj kaj Borkorabistoj?" demandis Ronjo.

"Tion vi spertos", diris Matiso.

"Do, bone", diris Ronjo.

"Kaj krome vi estu atentema, ke vi ne perdiĝu en la arbaro", diris Matiso.

"Kion mi faru se mi perdiĝas en la arbaro?" demandis Ronjo.

"Vi serĉu la ĝustan vojon", diris Matiso.

"Do, bone", diris Ronjo.

"Kaj ankaŭ vi estu atentema, por ke vi ne falu en la riveron", diris Matiso.

"Kion mi faru, se mi falas en la riveron?" demandis Ronjo.

"Vi naĝu", diris Matiso.

"Do, bone", diris Ronjo.

"Kaj vi atentu, por ke vi ne falu en la Faŭkon de l' infero", diris Matiso. Tiel li nomis la abismon, kiu dividis la Matiskastelon en du partojn.

"Kion mi faru, se mi falas en la Faŭkon de l' infero?" demandis Ronjo.

"Tiam vi ne plu faros ion ajn", diris Matiso kaj poste li eligis kriegon, kvazaŭ subite ĉiuj malbonaĵoj estus okupintaj lian bruston.

"Do, bone", diris Ronjo kiam Matiso ĉesis kriegi. "Do mi ne falu en la Faŭkon de l' infero. Ĉu ankoraŭ io?"


"Jes, certe", diris Matiso. "Sed tion vi spertos iom post iom. Nun iru!"

2

Kaj Ronjo iris. Ŝi baldaŭ komprenis, kiel stulta ŝi estis – kiel ŝi povis kredi, ke la granda ŝtonhalo estas la tuta mondo? Eĉ ne la grandega Matiskastelo estas la tuta mondo, ne, la mondo estas pli granda. Ĝi estas tiel granda, ke oni forgesas spiri. Ŝi ja aŭdis Matison kaj Lovison preparoli aferojn ekster la Matiskastelo. Ili menciis la riveron. Sed nur nun, kiam ŝi vidis, kiel ĝi kun sovaĝaj torentoj venis muĝante profunde el sub la Matismonto, ŝi komprenis, kio estas rivero. Kaj nur nun, kiam ŝi vidis ĝin malluma kaj stranga kun ĉiuj siaj surantaj arboj, ŝi komprenis kio estas arbaro, kaj ŝi ridis silente nur pro tio, ke ekzistas rivero kaj arboj. Ŝi apenaŭ povis kredi tion, imagu, ekzistas grandaj arboj kaj grandaj akvoj kaj ili vivas, ĉu oni povas ne ridi!

Ŝi sekvis vojeton rekte en la plej sovaĝan arbaron kaj venis al lageto. Pli malproksimen ŝi devis ne iri, laŭ ordono de Matiso. Kaj la lageto kuŝis tie, inter malhelaj arboj, nur la akvolilioj sur la akvo lumis blankaj. Ronjo ne sciis, ke tiuj estas akvolilioj, sed ŝi rigardis ilin longe kaj ridis mallaŭte, ĉar ekzistas akvolilioj.

Ĉe la lageto ŝi restis la tutan tagon kaj faris multon, kion ŝi neniam provis antaŭe. Ŝi jetis abikonusojn en la akvon kaj



ridis, kiam ŝi trovis, ke ŝi povas igi ilin ondolule forveli, kiam ŝi plaŭdis per la piedoj en la akvo. Pli bone ŝi neniam amuzis sin. Ŝiaj piedoj sentiĝis gajaj kiam ŝi grimpis. Ĉirkaŭ la lageto estis grandaj muskokovritaj ŝtonblokoj, konvenaj por rampado kaj abioj kaj pinoj por grimrado. Ronjo grimpis kaj rampis ĝis la suno komencis malaperi malantaŭ la arbokovritaj montetoj. Tiam ŝi manĝis la panon kaj trinkis la lakton, kiujn ŝi havis en la leda saketo. Poste ŝi kuŝiĝis sur la musko por iomete ripozi kaj super ŝi susuris la arboj. Ŝi kuŝis kaj rigardis ilin kaj ridis mallaŭte pro tio, ke ili ekzistas. Fine ŝi ekdormis.

Kiam ŝi vekigis estis jam malluma vespero, kaj ŝi vidis stelojn brili super la arbopintoj. Tiam ŝi komprenis, ke la mondo estas ankoraŭ multe pli granda ol ŝi imagis. Kaj ŝi fariĝis melankolia pro tio, ke steloj ekzistas sed ne estas atingeblaj, kiel ajn oni sin streĉas. Nun ŝi jam estis en la arbaro pli longe ol ŝi rajtis. Nun ŝi devas iri hejmen, alie Matiso fariĝos furioza, tion ŝi sciis.

La steloj spegulis sin en la lageto, ĉio cetera estis karbe nigra mallumo. Sed al mallumo ŝi alkutimiĝis. Ĝi ne timigis ŝin. Ĉu la Matiskastelo en la vintraj noktoj, kiam estingiĝis la fajroj, ne estis multe pli malluma ol ĉiuj arbaroj? Ne, mallumon ŝi ne timis.

Ĝuste kiam ŝi estis ironta, ŝi memoris pri la leda saketo. Ĝi restis sur la ŝtono, sur kiu ŝi manĝis, kaj en la mallumo ŝi suprengrimis por preni ĝin. Ŝi subite imagis, ke tie ĉi, sur la granda ŝtono, ŝi venas pli proksimen al la steloj, kaj ŝi su-

prenlevis siajn manojn por provi, ĉu ŝi ne povas kolekti kelkajn por hejmenporti en la saketo. Sed tio ne sukcesis. Ŝi prenis la saketon kaj intencis malsupreniĝi.

Tiam ŝi vidis ion, kio timigis ŝin. Ĉie inter la arboj briletis okuloj. Jes, estis rondo de okuloj ĉirkaŭ la ŝtono, kiuj observadis ŝin, kaj nur nun ŝi rimarkis tion. Neniām antaŭe ŝi vidis okulojn, kiuj povas lumi en la mallumo, kaj ŝi ne ŝatis ilin.

"Kion vi volas?" ŝi kriis. Sed ŝi ne ricevis respondon. Antaŭe, la okuloj proksimiĝis. Malrapide, iom post iom, ili pli kaj pli alproksimiĝis, kaj ŝi aŭdis murmuron de voĉoj, strangaj, maljunaj grizaj voĉoj, kiuj murmuris kaj ĉantis seninterrompe:

"Grizgnomoj ĉiuj, homo troviĝas en Grizgnomarbaro, grizgnomoj ĉiuj, mordu kaj batu, grizgnomoj ĉiuj, mordu kaj batu!"



Kaj subite ili estis tuj ĉe la ŝtono, kuriozaj, grizaj estaĵoj, kiuj minacis ŝin. Ŝi ne vidis ilin, sed ŝi sentis kun frostotremo, ke ili estas tie. Kaj nun ŝi sciis, kiel danĝeraj ili estas, la grizgnomoj, kontraŭ kiuj ŝi devas gardi ŝin, tion ja diris Matiso. Sed nun estis tro malfrue.

Ĉar nun ili komencis bati la ŝtonon per klaboroj kaj bastonoj aŭ per kio ajn trovebla. Bruis kaj krakis kaj eĥis tiel malagrabla en la arbara silento, kaj Ronjo kriis, ŝi timis pro sia vivo.

Kiam ŝi kriis, la gnomoj ĉesis bati. Sed nun ŝi aŭdis ion pli malagrablan. Ili komencis grimpi la ŝtonon. De ĉiuj flankoj ili venis en la mallumo. Ŝi aŭdis iliajn piedojn skrapi kaj ŝi aŭdis ilian murmuron:

"Grizgnomoj ĉiuj, mordu kaj batu!"

Tiam Ronjo senespera kriis multe pli forte kaj batis ĉirkaŭ si per la leda saketo. Baldaŭ ili atakos kaj mortmordos ŝin, tion ŝi sciis. Ŝia unua tago en la arbaro estos ŝia lasta.

Sed ĝuste en tiu momento ŝi aŭdis kriegon, kaj tiel furioze nur Matiso povis kriegi. Jes, jen li venas, ŝia Matiso, kun ĉiuj siaj rabistoj. Iliaj torĉoj lumis inter la arboj, kaj la kriego de Matiso eĥis en la arbaro:

"Foriru, grizgnomoj. Flugu en funelon, aŭ vi mortos!"

Kaj tiam Ronjo aŭdis la puŝbruon de etaj korpoj, kiuj ĵetis sin malsupren de la ŝtono. Tuj Matiso estis tie kaj brakumis ŝin, kaj ŝi ploris en lian barbon dum li portis ŝin hejmen al Matiskastelo.

"Nun vi scias, kio estas grizgnomoj", diris Matiso, kiam ili sidis antaŭ la fajro kaj varmigi la malvarmajn piedojn de Ronjo.

"Jes, nun mi scias, kio estas grizgnomoj", diris Ronjo.

"Sed kiel vi traktu ilin, tion vi ne scias", diris Matiso. "Se vi timas, ili sentas tion je longa distanco kaj fariĝas danĝeraj."

"Jes", diris Loviso. "Tiel estas en multaj situacioj. Tial estas plej sekure ne esti timema en la Matisarbaro."

"Tion mi memoros", diris Ronjo. Tiam Matiso suspiris kaj premis ŝin forte al ŝi.

"Sed vi memoras, pri kio mi diris, ke vi estu atentema?"

Jes, certe ŝi memoris tion. Kaj dum la sekvaj tagoj Ronjo faris nenion krom atenti danĝerojn kaj ekzerci sin ne timi. Matiso ja diris, ke ŝi devas eviti fali en la riveron, tial ŝi gajhumore saltadis sur la glataj ŝtonoj ĉe la riverbordo, kie la torento estis plej forta. Ŝi ja ne povis iri en la arbaro kaj tie atenti

la riveron. Se la ekzercado estu utila, ĝi devas okazi ĉe la torentoj kaj ne aliloke. Por veni al la torento, ŝi devis malsuprengrimpi la Matismonton, kiu krutis abrupte al la rivero. Tiamaniere ŝi ankaŭ povis ekzerci sin ne timi. La unuan fojon estis malfacile, tiam ŝi timis tiel, ke ŝi devis fermi la okulojn. Sed iom post iom ŝi fariĝis pli kuraĝa, kaj baldaŭ ŝi sciis kie troviĝas la fendoj, kie ŝi povas meti siajn piedojn kaj kie oni devas premi per la piedfingroj por ne fali malantaŭen en la torenton.

Kia bonŝanco, ŝi pensis, trovi lokon kie oni povas kaj atenti la torenton kaj ekzercadi kuraĝon.

Tiel ŝiaj tagoj pasis. Ronjo ekzercadis kaj atentis pli multe ol Matiso kaj Loviso sciis kaj fariĝis fine kvazaŭ vigla besteto, facilmovi kaj forta, kaj ŝi timis nenion. Ne grizgnomojn, ne harpiojn, nek ŝi timis perdiĝi en la arbaro aŭ fali en la riveron. Ankoraŭ ŝi ne komencis ekzerci ne fali en la Faudon de l' infero, sed tion ŝi baldaŭ faros, ŝi pensis.

La Matiskastelon ŝi tamen jam esploris eĉ ĝis la supro. Ŝi trovis vojon en ĉiuj dezertaj salonoj, kie neniu krom ŝi metis sian piedon, kaj ŝi ne perdiĝis en subteraj irejoj aŭ sur sekretaj arbarvojoj, nun ŝi konis ilin ĉiujn kaj trovis vojon ĉie. Sed ŝi plej ŝatis la arbaron, kaj tie ŝi kuradis tutajn tagojn.

Sed kiam vesperiĝis kaj falis la mallumo kaj la fajro flamis en la forno de la ŝtonhalo, tiam ŝi venis hejmen, laca post tuttaga ekzercado kaj atentado. Je tiu horo revenis ankaŭ Matiso kaj liaj rabistoj post siaj vagadoj, kaj Ronjo sidis kun ili antaŭ la fajro kaj kantis iliajn rabistajn kantojn. Sed pri ilia rabista vivo ŝi sciis nenion. Ŝi vidis ilin reveni vespere kun varoj sur la ĉevaldorsoj, multaj diversaj specoj de varoj en sakoj kaj ledaj saketoj kaj kestoj kaj skatoloj. Sed de kie ili havis tiujn varojn, tion neniu klarigis al ŝi, kaj ŝi cerbumis pri tio same malmulte, kiel ŝi pripensis de kie venas la pluvo. Aferoj kaj objektoj simple ekzistas en la mondo, tion ŝi ja rimarkis.

Kelkfoje ŝi aŭdis, ke oni parolis pri la Borkorabistoj, kaj tiam ŝi memoris, ke ŝi devas esti singarda ankaŭ koncerne ilin. Sed ŝi ankoraŭ neniam vidis ilin.

"Se Borko ne estus tia kanajlo, mi preskaŭ kompatus lin", Matiso diris unu veperon. "La gardistoj ĉasas lin en la Borkoarbaro, li ne havas trankvilan momenton nuntempe. Kaj baldaŭ ili elfumos lin el lia rabistejo, jes, jes, li estas fiulo, do ne gravas, sed tamen."

"Ĉiuj Borkorabistoj estas fiuloj", diris Kalva Petro kaj ĉiuj konsentis.

Kia bonŝanco, ke la Matisrabistoj estas tiom pli bonaj. Ronjo pensis. Ŝi rigardis ilin, kiam ili sidis ĉe la longa tablo kaj sorbaĉis supon. Barbaj ili estis, kaj malpuraj kaj kverlemaĵaj kaj sovaĝaj. Sed neniu nomu ilin fiuloj dum ŝi aŭskultas. Kalva Petro kaj Ĝego, Pelje kaj Fjosok, Jutis kaj Joen, Laban kaj Knoto, Turre kaj Tjorm, Sturko kaj Klipeto, ili ĉiuj estis ŝiaj amikoj kaj pretus trairi fajron kaj akvon por ŝi, tion ŝi sciis.

"Ne, mi preferas la Matiskastelon", diris Matiso. "Ĉi tie oni estas sekura kiel la vulpo en la nesto kaj la aglo sur la monto. Se venos iuj napokapo-gardistoj ĉi tien por kvereli, ili flugos rekte en la funelon, tion ili scias."

"Rekte en la funelon kun furzeto", diris Kalva Petro kontente. Ĉiuj rabistoj konsentis, kaj ili ridis nur pripensante, kia napokapo oni devas esti por provi enpenetri en la Matiskastelon. Ĝi situis sur roko, neatingebla de ĉiuj direktoj. Nur de la suda flanko mallarĝa rajdvojo kondukis malsupren kaj malaperis en la arbaron. Sed de tri flankoj la Matiskastelon ĉirkaŭis abruptaj krutejoj. "Kiu napokapo provus grimpi tie", ridkluke demandis sin la rabistoj. Ĉar ili ja ne sciis, ke Ronjo kutimis ekzerci malmonton.

"Kaj se ili venos laŭ la rajdvojo, ili venos al abrupta halto ĉe la Lupokaptilo", diris Matiso. "Tie ni povas haltigi ilin per grandaj ŝtonoj. Kaj ankaŭ per aliaj aĵoj, se necesas."

"Kaj per aliaj aĵoj, se necesas", diris Kalva Petro kaj subridis, kiam li imagis al si, kiel oni povas haltigi la gardistojn ĉe la Lupokaptilo. "Multajn lupojn mi kaptis tie siatempe", li aldonis, "sed nun mi estas tro maljuna kaj kaptas nenion krom miajn propraj pulojn, ho ve, ho ve."



Vad gör pengarna på banken?

Vare sig vi skyller på Luther eller inte så har de flesta av oss i ryggmargen, att en ordnad ekonomi betyder att det också ska finnas en buffert på banken för oförutsedda – eller förutsedda – utgifter. Den principen ska man inte ändra på. Men.

Pengar på postgirot ger ränta, men knappt så det täcker inflationen. En tusenlapp på banken ger, efter inflationen, för ett år pengar som motsvarar en halv biobiljett.

Verksamheten i Esperantoförlaget hindras av kapitalbrist. Kapitalet består av flera ton böcker, som sprids över Sverige och världen i aldrig sinande, men mycket liten ström. Strömmen av böcker ut från förlaget skulle kunna bli betydligt stridare om vi bara hade kapital att sätta i arbete. I stället för att sitta med armarna i kors och vänta på att få igen de pengar som tidigare tryckningar har kostat, för att därefter kunna trycka nästa bok.

Så om er klubb har lite mer på bank och postgiro än vad som är nödvändigt ber vi er överväga en sak: att köpa andelsbevis i den ekonomiska föreningen. Förlagsföreningen är alltså en kooperativ förening: andelarna motsvarar aktierna i ett bolag.

Räntan blir noll, men pengarna arbetar för esperantos spridning, och det var väl det som var meningen!

Att teckna andelar är enkelt. Sätt in ett belopp på Esperantoförlagets postgiro 578-5 och skriv "Andelar" på talongen.

Esperantoförlagets styrelse

TRA LA LANDO

Eldona Societo nun en Stokholmo

Dum kelkaj someraj tagoj la tuta libro-stoko de Eldona Societo Esperanto estis tranlokigita de Malmö al Stokholmo (Bromma). Dudeko da libervolaj helpantoj kolektiĝis en la du lokoj por peza fizika laboro. Neniu fotis en Malmö, sed en Bromma aperis fotilo por havi pruvon, ke oni fakte tie laboris. Sur la fotoj videblas Kajsa, Bertilo, Janko, Bo Mee, Franko kaj Tomas.

Eldona dankegas al ili kaj ankaŭ al ĉiuj, kies vizaĝoj ne aperas sur la bildoj, sed tamen per ŝvito kaj (poste) polvaj manoj kaj vestaĵoj kontribuis al la sukcesa translokigo.

Specialan dankon al Bengt Nordlöf, kiu veturigis la grandan ŝarĝaŭton al Malmö kaj reen.

(laboris kaj fotis Roland L)

JAJAMÄN!

Redan 2-3 mars hålls det nya kurser i Skövde. Fem nivåer: barn, nybörjare, lätt fortsättning, avancerad fortsättning, konversation/grammatik.

Börjar 2/3 kl. 10, slutar 3/3 kl. 15.30.

Ring Gunnar (0500-416451) eller Carl-Erik (500-486237) för program och anmälan. Eller faxa (0500-486237). Pris 200 kr (barn 25 kr).

Veckoslutskurs i Skövde

7-8 oktober ordnade Skövde Esperantoklubb, med Gunnar Olsson som huvudansvarig, en mycket lyckad veckoslutskurs med deltagare från Danmark, Irak, Japan, Norge och Finland. Ett 40-tal elever delades upp i tre grupper ledda av lärarkrafter från Karlskoga, Göteborg och Skövde.

Gruppen för nybörjare leddes av Lars Forsman, som i sin dagliga gärning undervisar i esperanto.

Fortsättningskursen tog Sascha hand om. Han fyllde 22 år i dagarna.

Sascha, eller Rolf som han också heter, kom till Karlskoga som 17-åring för att läsa esperanto hos Lars Forsman. Idag är han engagerad av TEJO för att påverka politiker att inse nyttan av esperanto. Sascha talar tyska, svenska, danska, engelska och esperanto flytande. Han har märkt under sina resor, bl.a. i Asien, att han fått bättre kontakter med de människor han mött då han använt esperanto jämfört med engelska.

Lördagens studier följdes av ett kvällsprogram där Gun från Götene bidrog med dragspelsmusik och sång, assisterad av kursens yngste deltagare, 8-åringe Emil.

Under kvällen berättade Lars Forsman om en kines som tidigt en morgon anträffades i sovsäck utanför folkhögskolan i Karlskoga. Kinesen hade använt både kinesiska och esperanto när skolans personal undrat vem han var. Först sedan han tagit fram ett kort och ivrigt sagt "Forsman, Forsman" hade man förstätt att det var fråga om esperantostudier.

Sascha berättade om hur han, som representant för TEJO, ofrivilligt kom att bli betraktad som säkerhetsrisk vid en audiens hos den nederländska drottningen. Han hade lagt ifrån sig en bunt papper för att kunna hälsa obehindrat på de kungliga. När han senare skulle hämta papperen var de försvunna. Under sökandet blev han hejdat av vakter. Av dem fick han veta, att de tagit hand om dem eftersom de misstänkte att de innehöll en bomb.

Vid avskedskaffet på söndagen konstaterade deltagarna att de var mycket nöjda med arrangemanget. Mycket talar för att en likande kurs kommer att ordnas våren 1996.

Karl-Gustaf Gustafsson

Kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas.

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPSNITTET RUSTIKA, TECKNAT AV FRANKO LUIN 1995]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto och andra språk.

OMNIBUS · BOX 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93 · FRANKO@OMNIBUS.SE

En *Lingvo Internacia* de februaro 1898 ni legas la jenon:

El Stokholmo skribas al ni konata esperantisto, fraŭlino M. F.: "Mi ĉiam atendas, atendas, atendas... Kial oni ne deziras fondi klubon Esperantistan en Stockholm? En la pasinta somero estis ja ĉe ni plej brilanta okazo de efikado por nia lingvo; oni diras aŭ murmuris, ke unu klubo fondiĝis. Tamen oni devas konfesi, ke tiu ĉi klubo estas plej silenta en mondo, ŝajne konsistas el nur silentuloj! Ĉar ne eĉ unu vorton ĝi diris al la publiko. Ĝi eĉ konservas sian silentadon ĝis tia grado, ke ĝi ne respondas je leteroj direktitaj al ĝi. Nome mi en la pasinta somero, kiam pasigis ĉe mi rusa esperantistino kelkajn semajnojn, skribis al unu 'fondanta membro' de tiu ĉi klubo kaj demandis pri adreso de aliaj esperantistoj, kiuj eble dezirus konatiĝi kun mia rusa gasto – sed eĉ murmuron mi ne aŭdis, aŭ linieton mi ne vidis de tiu ĉi sinjoro.

Kaj tamen mi scias, ke en Stokholm vivas multaj, eĉ multegaj, virinoj konantaj nian lingvon kaj dezirantaj perfektigi en ĝi; do kial oni ne volas doni al ili helpan manon? Fondiĝo de klubo Esperantista en Stockholm estas necesega: ni nur serĉas la viron. Ĉu li ne venos? Aŭ povas esti, la sinjoroj ne deziras helpi al la sinjorinoj en la afero de Esperanto. Tiam ili, eble, unu tagon estos surprizitaj per la fondiĝo de 'La klubo esperantista de sinjorinoj' en Stokholm! Kaj tien ili ne estos enlasitaj."

Esperanto-gazetaro en Svedio: 100 jaroj

La sveda esperanto-gazetaro estas centjara. En januaro 1896 aperis en Upsalo la unua regula numero de *Lingvo Internacia*, la dua esperanto-gazeto en la mondo.

Jam en decembro 1895 Klubo Esperantista de Upsalo aperigis provnumero de *Lingvo Internacia*. Ĝi estis 16-paĝa, nur iom pli granda ol la nuna formato A5. En la provnumero la redakcio deklaras, ke "la celo de nia gazeto estas vastigado kaj prilaborado de la lingvo internacia *Esperanto*".

En la sama artikolo ili ankaŭ donas la celon de la lingvo: "Lingvo internacia apartenas al nenia nacio. Ne ekzistas popolo, kiu konstante parolas ĝin, ne ekzistas regno, en kies limoj ĝi estas konstante uzata, ne ekzistas homo, kiu povas nomi ĝin lingvo parenca. Nia lingvo aperas tie, kie oni sentas bezonon je ĝi, kaj kiam malaperas la bezono, malaperas ankaŭ la lingvo. Nia lingvo estas lingvo tute neŭtrala, ilo de inter-komunikigo por ĉiuj, kaj la historio de nenia popolo restigis en ĝi postsignojn. Scienculo kaj komercisto, turista kaj literaturisto, maljunulo kaj junulo – ĉiuj ĝin uzas, por ĉiuj ĝi servas egale, kiam ili havas bezonon korespondadi aŭ paroli kun homoj de aliaj gentoj."

Estis tre kuraĝa ago en 1896 aperigi monatan gazeton en esperanto. Meze de 1895 ĉesis aperi *La Esperantisto*, la unua kaj tiam sola esperanto-gazeto. La malforta, neorganizita movado restis sen organo. La klubo de Upsalo ne estis speciale granda kaj ĝi konsistis parte el studentoj. Sed ĉe ili ekzistis sufiĉa entuziasmo por surpreni tiun riskon.

La ĉefmotoroj de tiu projekto estis Valdemar Langlet en Upsalo kaj Vladimir Gernet en Odoso, kiu finance subtenis la projekton. Gernet estis hemingenero en vinberinstituto apud Odoso. El la du li estis, almenaŭ komence, la lingve pli sperta, tial ĉiuj manuskriptoj migris de Upsalo al Odoso kaj reen, kun la rezulto, ke ofte la numeroj malfruiĝis aŭ ke leteroj malaperis. Aliajn fojojn profesiaj zorgos devigis lin flankmeti la temporaban laboron por esperanto (vidu leteron – tajpitan! – de Gernet al Paul Nylén sur la apuda paĝo).

Valdemar Langlet estis tiu, kiu havis la ĉefan taskon pri la gazeto en Upsalo.

Li estis unu el la fondintoj de la Upsala klubo kaj fariĝis pli poste la unua prezidanto de SEF (aŭ Sveda Esperanto-Societo, kiel estis ĝia origina nomo). Tre frue li utiligis esperanton en siaj vojaĝoj kaj skribis pri siaj spertoj tiurilataj, kaj en *Lingvo Internacia* kaj en apartaj eldonaĵoj. Ĉar liaj vojaĝoj ofte daŭris dum monatoj, aliaj devis prizorgi la gazeton dum lia foresto. Plej ofte tio estis Paul Nylén, vicprezidanto de la klubo, kiu per informo en la decembra numero de 1897 ankaŭ formale fariĝis redaktoro de la gazeto.


Usono. Nur unuopaj, sed ke la scio pri tute nova lingvoprojekto kaj ĝia sola gazeto jam havis interesitojn en aliaj mondopartoj, estas mirinda. Pripensu, ke ankoraŭ ne ekzistis radio (ĝi estas invento de 1895), nek aviadiloj.

Pro tiuj listoj ni scias, ke nur ĉirkaŭ 500 ekzempleroj de la gazeto estis distribuataj al abonantoj (517 en 1896, 526 en 1897, 486 en 1898; por 1899, la lasta jaro de la "sveda eldonperiodo", mankas informoj).

Sed ni scias, ke pli da ekzempleroj estis presataj kaj ke multaj el ili estis dissendataj senpage reklamcele. Por la jaro 1897 ekzistas detala listo skribita mane de Valdemar Langlet, laŭ kiu ni ekscias, ke estis normale presitaj 1200 ekzempleroj, krom de numero 2, kiu presiĝis en 2000. Laŭ la samaj notoj estis pagitaj al la presejo 250 kronoj la 1-an de julio kaj 180+430 kronoj la 30-an de decembro. Tio ne estis pago por ĉiuj numeroj de 1897, ĉar numero 12 estis presita nur la 8-an de februaro 1898.

La aperitmo estis iom neregula [en tio do nia *La Espero* havas historian precedencon]. Du numeroj (1 kaj 2) estis presitaj en februaro, n-ro 3 la 20-an de marto, n-ro 4 jam la 5-an de aprilo, la 12-an de majo aperis n-ro 5, la duobla numero 6–7 la 22-an de julio – do tute akurate dum la unua duonjaro, sed post tio la aperitmo ŝanĝiĝis. Nur la 21-an de oktobro aperis numeroj 8–9, la 18-an de decembro n-ro 10 kaj la 28-an de la sama monato n-ro 11.

Ĉu la malregula aperitmo dum la dua duonjaro estis kaŭzita de malregula poŝta servo, de la vojaĝoj de Langlet aŭ de nepagitaj fakturoj, tion ni ne povas ekscii de tiu manuskripto de Langlet. Sed ni povas konkludi, ke la entrepreno ne estus vivopova sen financa helpo de kelkaj individuoj: unuavice Vladimir Gernet, sed ankaŭ aliaj, kiuj ebligis, ke, ekzemple, la unua jarkolekto ampleksis 236 paĝojn anstataŭ la promesitaj 192. Kaj kiam la ekonomio de Gernet fine de 1898 ne plu permesis, ke li pagu la preskoston, la gazeto eniris krizon. La unua numero de 1899 aperis nur la 25-an de julio. Tamen aperis 12 numeroj dum la jaro, kelkfoje je semajna interspaco, sed nur 8-paĝaj.



Vere internacia gazeto

Lingvo Internacia estis vere internacia gazeto. Ĝi aperis en Svedio, sed havis plej multajn legantojn ekster la lando. Ni tre bone scias, kiuj abonis ĝin dum la unuaj tri jaroj, ĉar la gazeto aperigis listojn de abonantoj. Plej multaj estis en tiama Ruslando (al kiu ankaŭ Pollando tiam kalkuliĝis), sed ekzempleroj de la gazeto atingis ankaŭ multajn aliajn eŭropajn landojn.

Malmultaj ekzempleroj iris ekster Eŭropo; ni trovis tamen adresojn de abonantoj en Brazilo, Japanio, Kanado, Nova Kaledonio, Sudafriko, Tunizio,

La gazeto survojis al certa morto, sed aperis subite savinto, hungara presisto Paŭlo de Lengyel, kiu certigis la pluan aperadon de la gazeto. Paul Nylén estis daŭre ĝia redaktoro, sed finiĝis ĝia up-sala periodo.

Pri kio ĝi skribis?

Karl Söderberg, kiu skribis historion de la esperantomovado en Upsalo (La Esperanto-movado en Uppsala, 1981), skribas jene pri la enhavo de *Lingvo Internacia*:

"La enhavo de la gazeto estis tre varia. La redakcio regule prezentis koncizajn artikolojn pri aktualaĵoj, kaj ofte aperis raportoj de eksterlandaj esperantistoj, ekzemple de Louis de Beaufront en Francujo kaj Ludoviko Zamenhof. Tutpaĝa artikolo en la "prova numero" havis la rubrikon "Iom pri la universitato en Upsala". Ĉiu numero enhavis novaĵojn pri la esperanta movado (konferencoj, ekspozicioj, vojaĝoj), recenzojn de novaperintaj libroj, nekrologojn ktp. Rakontoj kaj poemoj – originalaj aŭ tradukitaj – okupas certan spacon en ĉiu kajero. Kelkfoje gramatikaj kaj aliaj lingvaj problemoj estis diskutataj, kaj ankaŭ estis prezentataj prijuĝoj pri esperanto de eminentuloj, ekz. la sveda majoro Claes Adelsköld (kiu komponis la unuan muzikon al la him-

no "La Espero" 1891 kaj malavare subvencii la libroeldonadon de la klubo). La anoncoj temis ĉefe pri esperantaj gazetaraj, literaturaj kaj korespondadaj."

Signifa por Svedio

La esperantomovado dum tiuj jaroj estis apenaŭ ekzistanta, kaj en Svedio kaj en la mondo. La sola sveda klubo estis tiu de Upsalo, sed en la paĝoj de la gazeto ni trovas plurajn alvokojn renkontiĝi kaj fondi klubojn en diversaj partoj de la lando (vidu leteron de fraŭlino F.M. el Stokholmo sub "Pretere"). Sen *Lingvo Internacia* la sveda movado verŝajne pli malrapide kreskus en tiu frua periodo.

La ebleco aperigi ion en esperanto tre frue instigis la svedajn esperantistojn traduki kaj verki mem. Apud diversaj ruslandaj kontribuajtoj la svedaj estas plej abundaj.

La apero de *Lingvo Internacia*, kie L.L. Zamenhof estis nura kunlaboranto, eĉ ne tre ofta, estis ankaŭ pruvo pri la maturiĝo de esperanto, ne plu dependa de sia iniciatinto. La lingvo en ĝi estas, ek de la provnumero, flua kaj korekta eĉ laŭ hodiaŭaj normoj. La semoj jetitaj de Zamenhof ekĝermis kaj jam kreskis sen lia konstanta zorgado.

Franko Luin

"Kara amiko"

Odessa, 28 de julio 98

Kara amiko!

Kredu, ke en ĉiuj Viaj leteroj kaj agoj estas nenio, kio povus min ofendi. Se iu devas sin senti kulpa, tio estas certe mi, ĉar mia silentado povas ŝajni efektive ofendanta kaj malgentila. Sed en la lasta tempo mi havis multegon da zorgoj tre ŝarĝaj: sufiĉe subite kaj neatendite mi devis havi tre seriozan ekzamenon de kandidato en nia universitato. Pro unu studenta historio mi devis eliri el la universitato antaŭ 5 jaroj kaj de tiu tempo la estraro ne volis doni al mi la permeson esti ekzamenata kaj ricevi la diplomon. La permeso venis nur en tiu ĉi printempo, kiam mi jam perdis la esperon ĝin ricevi kaj komencis tre sukcese forgesadi ĉion sciindan kaj postulotan por la ekzameno krom mia amata ĥemio, kiu min ĉiam okupas. En malespero mi kolektis ĉiujn fortojn, metis flanken ĉiujn aferojn, donantajn panon por la stomako kaj nutron por la animo, forgesis pri miaj devoj de edzo, patro kaj esperantisto, forsendis la familion en somerloĝejon kaj arestis min en la ĉambro por renovigi la sciojn je geologio, mineralogio, zoologio, fiziologio kaj aliaj "logioj", kiuj estas sufiĉe multaj por malesperigi la malfortan prudenton de homo. Tio ĉi jam pasis, pasis kiel ventego kun fulmotondro, sed kiam mi revenis hejmen post la lasta ekzameno kaj "ekzamenis" la leterojn, ricevitajn dum mia aresto, min prenis teruro kaj iom post iom en mi komencis kreski la konvinko (ne senfundamenta), ke en mia korespondado neniam regos bona ordo. Jen estas la veraj kaŭzoj de mia silentado kaj de miaj rompataj promesoj de bona konduto.

Unu mia letero kun adresoj de niaj abonantoj sendube ie perdiĝis, ĉar venas al mi multego da plendoj pri la nericevo de la gazeto kaj ĉar vi mem skribis, ke vi ne ricevis la adresojn de la francaj abonantoj.

Mi jam resendis la korekturon de la duobla numero 6-7. El tiu ĉi numero ni bezonas la apartajn depresaĵojn de nia alvoko por dissendi ĝin al la kuracistaj societoj. Volu mendi 2000 da ekz. de la alvoko al la presisto. Kompreneble kelkaj vortoj antaŭ la alvoko devas foresti en la depresaĵoj. Devas foresti ankaŭ la titolo "Alvoko". Anstataŭ ĝi volu meti la titolon:

PRI LA LINGVO EN MEDICINAJ KONGRESOJ INTERNACIAJ kaj poste devas sekvi la vortoj: "De tiu tempo" k.t.p.

Ni bezonas ankaŭ la svedan tradukon de la alvoko. Sendube iu el la svedaj amikoj ne rifuzos fari ĝin kaj sendube la Upsala Klubo ne rifuzos helpi la vastigon de la alvoko, montrante al ni la adresojn, laŭ kiuj estus utile ĝin sendi. Eble ekzistas ia informa libro por la svedaj kuracistoj, kie sin trovas la adresoj de diversaj medicinaj societoj, jurnaloj k.c.?

Baldaŭ mi sendos al vi la materialojn por presado. La monon mi ankaŭ povos baldaŭ sendi. Nun mi aldonas unu traduketon, kiun vi povas presi, se Vi trovos ĝin inda.

Amikan manpremon de via plej kore
V. Gernet

P-S. Kial Vi ne represas la novaĵojn el la "Esperantiste" de Beaufront? Ne ĉiuj abonas tiun ĉi gazeton, kaj la progreso de la afero estas por ĉiuj esperantistoj plej interesa.*

* En la septembra numero de 1898 fakte aperis artikolo pri L'Esperantiste verkita de Paul Nylén.

PRAGO 96

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 20-27 JULI 1996

Anmälningavgifter i svenska kronor

Kategori	till 96-03-31	efter 96-04
Direktmedlem i UEA (ej MG)	1200	1435
Icke direktmedlem i UEA	1500	1780
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1 jan. 96) som är direktmedlem i UEA	600	725
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1 jan. 96) som inte är direktmedlem i UEA	900	1075

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 31 december 1975 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgifterna komma att justeras uppåt.

Anmälningblanketter för kongressen kan beställas hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel. 0415/50 152. Blanketten skickas ifyllt tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperanto-förbundet, Specialkonto.

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Esperanto kiel hejma lingvo

Unu el la interretaj adresoj menciitaj en la antaŭa numero de La Espero estis la "diskutejo" Denask-L. Ĝia prizorganto Jouko Lindstedt prezentas ĝin jene:

La listo DENASK-L funkcias kiel enreta diskutejo pri ĉiaj temoj, kiuj rilatas al la fenomeno "denaskaj parolantoj de esperanto". Ĝi estas do celita ekzemple al:

- gepatroj de denaskaj parolantoj, sendepende de ilia aĝo;
- denaskaj parolantoj mem;
- ĉiuj, kiujn interesas dulingva edukado, en kiu esperanto estas unu el la lingvoj.

Diskonatigu la liston! Petojn pri aliĝo oni sendu al la administranto: jouko.lindstedt@helsinki.fi

La listo estas libere uzebla por siaj anoj: iu ajn mesaĝo direktita al denask-l@helsinki.fi aŭtomate dissendiĝas al ĉiuj listanoj.

La temoj de la mesaĝoj povas esti plej diversaj — ankaŭ tre praktikaj, ekzemple: "Kiel vi kutimas nomi tian ĉiutagan aĵon en via hejmo?" Rimarku, ke ricevinte mesaĝon de la listo, vi povas respondi aŭ al la listo (tiam ĉiuj listanoj povos legi vian respondon) aŭ al la sendinto persone. Ĉar la nombro de la listanoj ne estas granda, plej ofte estas kon-

silinde respondi al la tuta listo kaj tiel estiĝi veran diskutadon — se ne temas pri vere persona mesaĝo. La administranto havas tamen la moralan devon haltigi diskutojn, kiuj estas rekte ofendaj kontraŭ iu persono aŭ tute ne rilatas al la temaro de la listo. En ekstrema kazo li povas malaligi listanon.

Mi rekomendas, ke antaŭ ol kontribui al la listo, ĉiu nova listano prezentu sin mem per mallonga mesaĝo, en kiu ŝi/li priskribas sian rilaton al la fenomeno "denaskaj parolantoj de esperanto". Oni rajtas tamen resti ankaŭ pasiva leganto, sen sinprezento.


Ĉiuj mesaĝoj aŭtomate arkiviĝas en Helsinko. Por ricevi ilin, uzu la programon "Majordomo", kiu teknike prizorgas la liston. Sendu al la adreso <majordomo@helsinki.fi> (ne al DENASK-L!) mesaĝon kun la unusola linio "index denask-l". "Majordomo" sendos al vi la nomojn de la akireblaj dosieroj. Poste, sendu al ĝi mesaĝon kun la linio "get denask-l xxx", kie xxx = la nomo de la dosiero, kiun vi deziras akiri. Se vi interesiĝas pri aliaj funkcioj de "Majordomo", sendu al ĝi la mesaĝon "help".

La arkivo de Majordomo estas por la uzo nur de la listanoj. Kiel sian publikan fasadon, la listo havas ankaŭ propran paĝon en TTT (angle: WWW). Ĝia URL estas: <http://www.helsinki.fi/~js-lindst/denask-l.html>

Tie vi trovas i.a. ligan al la labora dosiero "familia/hejma vortaro".

Jouko Lindstedt

KRUCVORTA ENIGMO 95/6



Horizontale

- 1 Ĝirafbest' – Bonfarta
- 2 Absurdaĵon
- 3 Ludejon – Inklino
- 4 Ne ŝiaj – Edzin' de nobelulo
- 5 En pako – Seksa inklino – Brita mezurumu'
- 6 Vira vest' – Teksaĵ' el lano
- 7 Turmentite
- 8 Ronĝulete – Orelinflam'
- 9 Rektangula – Serbo aŭ polo
- 10 Argilaĵlokon

Vertikale

- A Kvarcaj – Ridindig'
B Rilata al komika desegnaĵo
C Tersurfaca – Prezo
Ĉ Patrino – Hispana moner'
D Infano – Rezult' en ŝako
E Akvomovo – Signo sur stano
F Subkomprenu – Komike strange
G Ne povas ni esti kontraŭ ĉio
Ĝ Deklinacia kazo
H Dezirinformon pri reklamaĵo

SOLVO DE 95/5

	A	B	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	A	T	E	S	T	A	S	■	I
2	P	R	O	T	E	S	T	A	N
3	R	A	N	A	N	■	A	V	E
4	O	N	■	L	A	T	R	I	N
5	■	K	V	I	N	■	T	O	J
6	E	V	E	N	T	E	■	A	N
7	V	I	R	G	A	S	■	A	R
8	I	L	A	R	■	T	U	R	B
9	T	A	M	A	R	I	N	D	O
10	A	N	O	D	O	N	■	E	N

Lennart Persson

